

# IpI 55

## Enhavo

<b>1</b>	<b>100 jaroj de Universalaj Kongresoj de Esperanto – Du proponoj kaj unu raporto (<i>Detlev Blanke</i>).....</b>	<b>2</b>
1.1	<b>Kiel priskribi la fenomenon? aŭ Ĉu ni bezonas pluan libron pri kongresoj? .....</b>	<b>2</b>
1.2	<b>Nova bezono: Internaciaj Konferencoj de UEA .....</b>	<b>3</b>
1.3	<b>La Esperantologiaj Konferencoj – iom bilance .....</b>	<b>5</b>
<b>2</b>	<b>Pri la faka programo de la 90-a UK en Vilno .....</b>	<b>7</b>
2.1	<b>La Internacia Kongresa Universitato (IKU) .....</b>	<b>7</b>
2.2	<b>La Esperantologia Konferenco .....</b>	<b>8</b>
2.3	<b>La Terminologia Forumo.....</b>	<b>9</b>
<b>3</b>	<b>Aranĝoj pri Eŭropa lingvo-politiko.....</b>	<b>10</b>
3.1	<b>La 4-a Nitobe Simpozio .....</b>	<b>10</b>
3.1.1	<b>Raporto .....</b>	<b>10</b>
3.1.2	<b>La programo.....</b>	<b>12</b>
3.1.3	<b>“Lingvopolitikaj aspektoj de la plivastiĝo de Eŭropa Unio” Konkluda Dokumenta de la 4-a Nitobe-Simpozio .....</b>	<b>13</b>
3.1.4	<b>“Language Policy Implications of the Expansion of the European Union – Concluding Document of the 4th Nitobe Symposium .....</b>	<b>17</b>
3.2	<b>Kulturdiplomatoj en Berlin pri eŭropa lingvo-politiko.....</b>	<b>21</b>
3.3	<b>Pri lingvo-politiko kaj lingvo-kulturo en Eŭropo – La 15-a konferenco de GIL.....</b>	<b>22</b>
<b>4</b>	<b>Aliaj aranĝoj .....</b>	<b>23</b>
4.1	<b>Internacia Studenta Konferenco en Ilmenau/Germanio .....</b>	<b>23</b>
4.2	<b>Pri la rolo de la germana kaj japana lingvoj en scienco en Tokio (<i>KIMURA Goro</i>) .....</b>	<b>24</b>
<b>5</b>	<b>Honorigo por prof. Aleksandro Duliĉenko .....</b>	<b>24</b>

# 1 100 jaroj de Universalaj Kongresoj de Esperanto – du proponoj kaj unu raporto

*Detlev Blanke*

## 1.1 Kiel priskribi la fenomenon? aŭ Ĉu ni bezonas pluan libron pri kongresoj?

Post Universalaj Kongresoj mi ofte malkontentas legante en diversaj revuoj pri tio, kiel partoprenintoj raportas pri la travivita UK. Tiuj artikoloj neniel montras la ampleksan fenomenon. Mi jam partoprenis aranĝojn, kie kongrespartoprenintoj kapablis paroli horon, sen menciigi la kongrestemon aŭ eĉ nur unu eron de la faka programo. Eble ni lernu pli bone kompreni, kio do estas tiu unika Universala Kongreso kaj kiel pli bone fruktuzi ĝin ne nur por nia amuziĝo sed ankaŭ por nia kleriĝo.

La libro de *Ziko Marcus Sikosek* „Sed homoj kun homoj - Universalaj Kongresoj de Esperanto 1905-2005“ (Rotterdam: UEA, 2005) pro tio sendube estas utila komenco por priskribi la fenomenon Universala Kongreso. La prelegoj kaj diskutoj okaze de la 100-jariĝo de la Universalaj Kongresoj ĉi-jare en Bulonjo kaj en Vilno substrekis la esence gravan rolon, kiun por la evoluo de la lingvo kaj ĝia lingvo-komunumo ludis resp. ludas tiuj aranĝoj. Sikosek sekvas kronologion kaj ofte elstarigas anekdotecajn trajtojn de unuopaj kongresoj. Sed ne estas mia tasko ĉi-tie recenzi la libron.

Oni ja povus imagi tute alikarakteran pluan libron, kiu eble respondus demandojn, kiujn la libro de Sikosek ne povis kaj eĉ ne planis respondi.

Ĉu ne estus interese ekscii, kiam oni unuan fojon donis al la kongresoj apartan temon kaj kiel tiuj kongrestemoj ŝanĝiĝis tra la jardekoj? Kion pri la rolo de eksteraj partneroj (ŝtataj reprezentantoj, diplomatoj, internaciaj ŝtataj kaj neŝtataj organizaĵoj)? Kian strukturon havis la fermaj kaj malfermaj aranĝoj? Kiun rolon ludis la kulturo? Kiel evoluis la diversnivela klerigaj programoj? Kiom oni traktis problemojn de esperantologio kaj de faka apliko de la lingvo? Estus interese verki pri la historio de la Internacia Somera (Kongresa) Universitato. Kion pri la evoluo de la belartaj kaj aliaj konkursoj, por trovi novajn talentojn?

Sed ankaŭ leviĝas aliaj demandoj respondeblaj pere de historia studo: Kiel kaj kiom efike dum la kongreso laboris la gvidinstancoj de UEA (la Komitato kaj la Estraro)? Kiel estis konsiderata la politika kaj religia neŭtraleco? Kion pri la evoluo de la infanaj kongresetoj kaj junularaj aranĝoj dumkongresaj? Krome estus bone havi kune ĉiujn kongresrezoluciojn por iom kompari ilian enhavon. Oni povus daŭrigi la liston.

Por respondi la levitajn kaj similajn demandojn necesus alitipa libro, ankoraŭ skribenda: Tiu libro ne prezentu kronologie la kongresojn kiel tutaĵojn. Ĝi

priskribu la evoluon de la *ĉefaj enhavaj tavoloj* de la kongresoj tra la jardekoj kaj montru ties erojn - kaj stabilajn kaj ŝanĝiĝintajn.

Kompreneble la verkado de tia libro estas malfacila, ĉar ne sufiĉus la trakribado de kongresraportoj en revuoj. Oni ankaŭ devus konsideri la kongreslibrojn kaj aliajn materialojn. Kaj tre grave estus intervjui tiajn homojn, kiuj organize kaj enhance partoprenis multajn kongresojn dum la lastaj jardekoj.

Eble iam troviĝos kuraĝulo(j) por ekverki tian libron. Ĝi povus esti tre helpa por la necesa diskuto kaj la ĉiam denove revenanta demando, kion konservi kaj kion ŝanĝi ĉe niaj Universalaj Kongresoj.

## **1.2 Nova bezono: Internaciaj Konferencoj de UEA**

### ***1.2.1 La strategia signifo de la Kongreso***

Dum la diskutado de la kongresa temo en Vilno multaj kontribuintoj aparte elstarigis la emocian signifon, kiun la Kongresoj por ili havis. Humphrey Tonkin en sia duparta prelego tamen ankaŭ tuŝis la strategian rolon, kiun la UKoj ludis kaj ludas por la lingvo mem kaj la lingvo-komunumo. Mi volas substreki tiun aspekton kaj elstarigi la gravecon de la Kongresoj i.a.:

- por la diskutado de bazaj kaj strategie gravaj problemoj de la evoluo de la lingvo kaj ĝia komunumo
- por la evoluigo de la scienca apliko de Esperanto (scienco per Esperanto)
- por la impulsado de esperantologiaj esploroj (scienco pri Esperanto)
- por la klerigado de la partoprenantoj (scio por esperantistoj)
- por la evoluigo de specifa esperanta kulturo
- por la stimulado kaj kunordigado de aktivaĵoj de la lingvo-komunumo sur internacia kaj nacia niveloj (agado per kaj por Esperanto)

### ***1.2.2 La troŝarĝita grupo***

Relative malgranda grupo da personoj estas engaĝita en la preparado kaj realigado de la kongreso kun sia multflanka programo. Ofte la samaj personoj ne nur preparas difinitajn programerojn, sed ankaŭ prelegas, gvidas aranĝojn, diskutigas la kongresanojn, preparas koncernajn dokumentojn ktp. Sed ili krome ne malofte ankaŭ sidas en diversaj gvidinstancoj (Komitato, Estraro, gvidantaroj de fakaj asocioj ks.). Krome necesas teni resp. renovigi kontaktojn ktp. Sekve ili kuras de unu aranĝo al alia, haste salutas tiun aŭ jenan kongresanon, kun kiu valorus pli longe paroli, kaj ne vere povas sin dediĉi al difinitaj temoj. Post la kongreso la laboro daŭras: verkado de raportoj, redaktado de materialoj, klopodado pri realigo de decidoj ktp.

Estas evidente, ke tiuj personoj dum la kongreso ne povas vere profunde trakti problemojn kaj preni sufiĉe bone preparitajn decidojn.

### ***1.2.3 Ne ĉiuj kompetentuloj kongresas***

Ne nepre ĉiu necesa kompetenteco por trakto pri difinitaj problemoj kolektiĝas dum la kongresoj. Iuj personoj, kies scion la komunumo bezonus, diverskaŭze neglektas la kongresojn. Aliaj ja volus, sed ne povas partopreni pro financaj kaj aliaj kialoj. Tio aparte koncernas fake moderne klerajn junulojn, kiuj antaŭ nelonge magistriĝis aŭ doktoriĝis pri siaj fakoj. Sen defioj, sen konkretaj taskoj ili eble malaperos el la movado.

Do, kion fari, por utiligi ankaŭ ilian kompetentecon?

### ***1.2.4 La propono: Strategaj Konferencoj***

Laŭ mi estus utile, ke UEA fondu serion da konferencoj, dum kiuj eblas trakti problemojn strategie gravajn por la lingvo-komunumo. Tiuj konferencoj povus kunvenigi kompetentajn fakulojn kaj gvidajn aktivulojn, kiuj dum difinita tempo kaj post bona prepariĝo profunde kaj profesinivele traktu iun temon. La rezultoj povus esti publikigitaj kiel aktoj („Aktoj de la Konferencoj de UEA“) kaj povus sekvigi rekomendojn aŭ propondokumentojn.

Por certigi la partoprenon de taŭgaj fakuloj necesas certa financigo de la konferencoj. Eventuale Esperantic Studies Foundation povus engaĝi sin.

Laŭ mi la konferencoj povus okazi en Roterdamo aŭ en aliaj taŭgaj lokoj kaj regionoj. Sed ili ne okazu antaŭ aŭ post la kongresoj, ĉar tio denove signifas aldonan ŝarĝon de la menciita persongrupo.

La rezultoj de la konferencoj povus reefiki al la kongresoj:

- Dum la kongresoj (sed kompreneble ankaŭ dum aliaj aranĝoj) eblas informi kongresanojn pri la konferencaj rezultoj kaj diskutigi ilin.
- La supre menciitaj ĉefe ŝarĝitaj personoj estus pli liberaj por klerigaj aranĝoj, diskutoj kaj renkontiĝoj kun la aliaj kongresanoj.
- La konferencaj rezultoj povas esti solida bazo por celkonformaj decidoj de la Komitato aŭ de aliaj gvidinstancoj.

UEA siatempe jam okazigis kelkajn pritemajn konferencojn. Inter alie en 1956 en la sveda urbo Frostavallen okazis konferenco pri informado. En 1960 en Bohinj (Jugoslavio) oni traktis pri Esperanto en lernejoj.

### ***1.2.5 Kelkaj temoj por la Konferencoj***

Ne mankas temoj, pri kiuj estus utile sisteme kaj profunde analizi kaj konkludi.

### Jen nur elekto:

- *La fenomeno kongreso kaj la aranĝaro de la lingvo-komunumo*
- *La rolo de lingvo-kultura instanco*
- *La faka lingvo, ĝia evoluo kaj evoluigo*
- *La stato de la esperanta leksikografio*
- *Historiografio*
- *Bibliotekoj, katalogoj, bibliografioj, arkivoj – kiel konservi la scion?*
- *Enciklopedioj*
- *Esperanto kaj esperantistoj en la reto – stato – ebloj – defioj*
- *La kulturo de la lingvo-komunumo*
- *Modernaj instruado kaj instruiloj*
- *Interlingvistiko kaj esperantologio: Stato, bezonoj kaj esplorstrategio*
- *La establiĝinta lingvo-scienco kaj ĝiaj rilatoj al Esperanto:  
Kiel lerni unu de la alia je reciproka utilo?*
- *Tradukado kaj interpretado – teoriaj kaj praktikaj aspektoj*
- *La konkurenco? Pri la situacio de aliaj planlingvoj kaj projektoj*
- *Klerigado en la lingvo-komunumo*
- *Profesinivela informado*
- *Libroj kaj gazetoj – problemoj de redaktado kaj eldonado*

Oni povus daŭrigi la liston kaj certe devas pensi pri prioritatoj.

### **1.3 La Esperantologiaj Konferencoj – iom bilance**

Ekde 1978 (63-a UK en Varna), responde al evidenta bezono, Detlev Blanke iniciatis la serion de esperantologiaj konferencoj. La 27-a okazis kadre de la 89-a UK(2004) en Pekino.

Temas pri diversstrukturaj aranĝoj, plej ofte pri prelegaro, foje kun podiaj diskutoj kaj seminarioj.

La celoj de tiuj aranĝoj i.a. estas

- diskutigi gravajn esperantologiajn temojn kaj tiel klerigi la kongresanojn,
- prezenti novajn problemojn, kiuj meritis priesploradon,
- instigi esperantologojn prezenti siajn temojn antaŭ interesita kaj kritika publiko,
- interkonatigi esperantologojn kaj helpi ilian spertinterŝanĝon,
- stimuli kaj kunordigadi esperantologiajn aktivecojn kaj
- kuraĝigi ankoraŭ nekonatajn fakulojn prezentiĝi kun siaj prelegoj.

Kvankam tiujn celojn la organizintoj nur parte atingis, la konferencoj apartenas al la plej ŝatataj kongresprogrameroj kaj ĉiam allogis multajn aŭskultantojn kaj diskutantojn. Plej ofte la prelegoj turniĝis ĉirkaŭ iu ĉefa kadra temo, inter kiuj menciindas i.a.

- Lingvoplanado en planlingvo (1982, Antverpeno)
- Fagleksiko en Esperanto (1983, Budapeŝto)
- Internacieco de Esperanto el ne-eŭropa vidpunkto (1986, Pekino)
- Esperantologio kaj ĝenerala lingvistiko (1988, Roterdamo)
- Esperanto kaj kultura identeco (1990, Havano)
- Esperantaj bibliotekoj kaj arkivoj de la mondo (1992, Vieno)
- Problemoj de la historiografio de Esperanto (1993, Valencio)
- Esperantologio komputile (1999, Berlino)
- La Esperanto-kulturo: diverseco en unueco, unueco en diverseco (2002, Fortalezo)
- Esploroj pri esperantologio: Kien iri kaj per kiuj vojoj? (2003, Gotenburgo)
- La rolo de ne-eŭropaj lingvoj en la evoluo kaj evoluigo de Esperanto (2004, Pekino).

Pri la esperantologia konferenco 2005 (Vilno) vidu la raporton sub 2.2.

Kvankam multaj prelegoj publikiĝis diversloke, nur de unu kompleta konferenco aperis la aktoj:

*„Esperanto kaj kulturo – sociaj kaj lingvaj aspektoj“ (1996, Praha; eldonis UEA en 2001).*

Inter la ĉefaj aranĝantoj de la konferencoj estas Humphrey Tonkin kaj Detlev Blanke, kiuj kunordigis kaj gvidis po 10 konferencojn, krome kelkajn kune.

La prelegintoj de la 27 konferencoj (ĝis 2004) estis:

William Auld, Juan Azcuénaga, Preben Bagger, BAK Giŭan, Julius Balbin, Gerrit Berveling, Detlev Blanke, García Blázquez, Marjorie Boulton, , Árni Bødvarsson, Werner Bormann, Renato Corsetti, Michael Cwik, Probal Daşgupta, Helga Farukuoye, Mark Fettes, Claude Gacond, Zbignew Galor, GOTOO Hiosi, Marinko Ĝivoje, Stojan Ĝuĝev, Martin Haase, Luis M. Hernández Yzal, HIRAI Yukio, Jaromir Jermař, Naokazu Kawasaki, Christer Kiselman, Boris Kolker, Ilona Koutny, Erich-Dieter Krause, KURISU Kei, Sergej Kuznecov, Mauro La Torre, Alain Lauffenburger, LI Kexi, Ulrich Lins, LIU Haitao, Francisko Lo Jacomo, Ronald Löttsch, Miroslav Malovec, Árpád Máthé, Geraldo Mattos, Dan Maxwell, , Aleksandro Melnikov, Carlo Minnaja, Rainer Noltenius, Marc van Oostendorp, Karolo Piĉ, Jonathan Pool, Nikola Rašić, Olav Reiersøl, Ryszard Rokicki, Victor Sadler, Neil Salveson, Klaus Schubert, Marcus Sikosek, István Szerdahelyi, Elena Ŝevĉenko, Zlatko Tişljar, Humphrey Tonkin, BlazioVaha, Adomatis Vaitilaviĉius, Willem A. Verloren van Themaat, Amri Wandel, Gaston Waringhien, John Wells, Akiko Woessink-Nagata, ZHOU Liŭi.

## **2 Pri la faka programo de la 90-a UK en Vilno**

Kadre de la 90-a Universala Kongreso de Esperanto, de 23-a ĝis 30-a de julio 2005 en Vilno/Litovio, okazis aro da fakaj aranĝoj, el kiuj mi menciuj la plej gravajn:

### **2.1 La Internacia Kongresa Universitato (IKU)**

Kadre de la 58.a sesio de IKU, sub la rektoreco de prof. Aloyzas Gudaviĉius, okazis jenaj prelegoj:

*Prof. Dr. Hans-Michael Maitzen/ Prof. Dr. Amri Wandel:*  
La Lakta Vojo – nia hejmo en la universo

*Dr. Ieva Ŝvarcaitė:*  
Homara agado en la teritorio de la lasta kontinenta glaciepoko en la ĉebalta regiono: ekologia aspekto

*Prof. Dr. Helmar Frank*  
La Sibiua programo de eŭrolingvistiko

*Prof. Vilmos Benczik*  
Skriba kaj voĉa Esperanto: La Internacia Lingvo en semiotika spegulo

*Prof. Dr. Aloyzas Gudavičius*  
Etnolingvistikaj aspektoj de Esperanto

*Prof. Dr. Jouko Lindstedt*  
La aĝo de lingvoj: Ĉu la litova vere estas maljuna kaj Esperanto juna lingvo?

*Prof. Dr. Shigeaki Nagamachi*  
Evoluo de matematiko kaj moderna matematika fiziko

*Prof. Toon Witkam*  
Nova vojo al aŭtomata tradukado

*Prof. Dr. Jane Edwards*  
Vampiroj

(La anoncita prelego de *prof. Dr. Aleksandro Duliĉenko* ne povis okazi pro malsaniĝo de la prelegunto).

La resumoj de la prelegoj manuskripte aperis en: Wandel, Amri (2005, Red.): IKU. Internacia Kongresa Universitato. 58a sesio. Vilno, 23-30 julio 2005. Rotterdam: UEA, 113 p.

## **2.2 La Esperantologia Konferenco**

La celo de la esperantologia konferenco, kiun preparis kaj gvidis Detlev Blanke, ĉi-foje estis, aparte al junaj resp. novaj esperantologoj, kiuj ankoraŭ ne estas tre konataj, doni la eblecon prezenti siajn esplorrezultojn.

Post enkondukoj de prof. Humphrey Tonkin kaj Detlev Blanke oni prezentis jenajn prelegojn:

*Mag. Aida Čižikaite*  
Uzo de refleksivo en la litova, Esperanto kaj kelkaj aliaj romandevenaj lingvoj

*Mag. Oksana Burkina*  
Pri la aktuala fonologio de Esperanto”

*Prof. Toon Witkam*  
La ekscito de lingvostatistiko



*Mag. Sébastien Moret*

Esperanto aŭ fremdaj lingvoj? Diskutado en Sovetlando 1920-1930”

*Dr. Christian Lavarenne*

La katolika eklezio kaj Esperanto - kelkaj novaj faktoj

*Lic. Andreas Künzli*

Metodologiaj aspektoj de projekto kiel Svisa Enciklopedio Planlingva

Aperos la aktoj de la konferenco.

### **2.3 La Terminologia Forumo**

Kadre de la Terminologia Forumo (preparita kaj gvidita de Detlev Blanke) eblis prezenti novajn projektojn de fakvortaroj kaj diskuti pri terminologiaj problemoj. Realiĝis jena programo:

#### I Projektoj

*Inĝ. Sandor Horvath*

Survoje al Maŝinfaka Vortaro

*Dr. Ieva Schwarzeite*

Multlingva Vortaro de Geografiaj Terminoj

*Margaret Chaldecott*

Pri Trika Faklingvo

#### II Organizaj problemoj de terminologia agado

*Dr. Detlev Blanke*

Aktuale pri TEC kaj ĝia retejo kaj informoj pri ĉeĥaj aktivadoj

#### III Problemoj de la farado de fakvortoj :

*Prof. LI Kexi*

Doni ne nur fiŝon sed ankaŭ fiŝadon – terminfaraj problemoj

*Inĝ. Marc Bavant*

Fakvortoj en Esperanto

#### IV Ĝenerala diskuto

(La prelego de Marc Bavant aperis en la Reto :

[http://perso.wanadoo.fr/kursoj/prelegoj/UK90\\_Terminologia\\_Forumo\\_ilustraĵoj.pdf](http://perso.wanadoo.fr/kursoj/prelegoj/UK90_Terminologia_Forumo_ilustraĵoj.pdf) )

### **3 Aranĝoj pri eŭropa lingvo-politiko**

#### **3.1 La 4-a Nitobe-Simpozio**

La 4-a Nitobe-Simpozio okazis post la 90-a UK en Vilno, de 30.7. – 1.8.2005. Ĝi traktis la kadran temon “Lingvopolitikaj aspektoj de la plivastiĝo de Eŭropa Unio”. Ni sube prezentas gazetaran raporton, la programon kaj la konkludajn dokumentojn en Esperanto kaj la angla. La esperanta teksto estas lingve iom glatigita.

##### **3.1.1 Raporto**

La estonteco de eŭropaj lingvoj estas minacata, diras fakuloj. La 25-nacia Eŭropa Unio devas agi decide, se ĝi deziras garantii la estontan vivipovon de siaj 21 oficialaj lingvoj, laŭ internacia renkontiĝo de ekspertoj en Vilno, Litovio.

La averton oni publikigis la 22-an de aŭgusto 2005 nome de la pli ol sepdek partoprenintoj en la Kvara Nitobe-Simpozio, inter ili universitatanoj, politikistoj, registaraj funkciuloj kaj lingvaj aktivuloj.

"Oni multe maltrankviliĝas pri la estonteco de la pli malgrandaj naciaj lingvoj, inkluzive la plimulton de la lingvoj de la novaj ŝtatoj-membroj de EU", diris d-ro Humphrey Tonkin, profesoro pri humanecaj studoj en la Universitato de Hartford, Usono, kaj unu el la kunvokintoj de la simpozio.

"Multaj decidoj estas nun farataj cele al fortigo de eŭropa unueco, sed sen konsidero de iliaj lingvaj implicoj", d-ro Tonkin aldonis.

Inter la partoprenantoj en la simpozio, kiu okazis en la litova parlamentejo de 30 julio ĝis 1 aŭgusto, estis parlamentanoj el Latvio, Litovio, Pollando, Slovakio kaj Slovenio.

Ili ĉiuj konsentis, ke iliaj naciaj lingvoj riskas diversmaniere flankenŝoviĝi ene de EU.

"Estis pli ol 500 eraroj en la latva traduko de la Konstitucia Traktato", notis la latva ministro pri edukado kaj kulturo, d-rino Ina Druviete. "Kiel entute havi sencoplenan politikan debaton en tiaj kondiĉoj?"

D-ro François Grin, profesoro pri ekonomiko en la Universitato de Ĝenevo, liveris pritakson de la ekonomiaj avantaĝoj al Britio de la vasta uzo de la angla kontraste al pli larĝa lingvomikso en Eŭropa Unio.

"Eĉ laŭ plej sobra kalkulo, tiuj transpagoj al Britio sumas je pli ol 10 miliardoj da eŭroj jare", diris d-ro Grin. "Pli aktiva multlingva politiko kostus similan sumon sed distribuus la kostojn kaj avantaĝojn multe pli egale."

La Simpozio aŭdis ankaŭ pledantojn por pli granda rolo por la internacia planlingvo Esperanto ene de EU.

"Ĝi estas la sola solvo samtempe justa kaj efika", pretendis d-ro Sean O'Riain, irlanda diplomato, kiu aktuale prezidas Eŭropan Esperanto-Union.

La konkluda dokumento de la Simpozio, redaktita de unu el la organizantoj de la Simpozio, d-ro Mark Fettes, profesoro pri edukado en Universitato Simon Fraser, Kanado, alvokas la ŝtatojn-membrojn de EU al kunlaboro pri evoluigo de komuna lingva kadro, kiu ekvilibrigu, unuflanke, protekton kaj pozitivan agnoskon de lingva diverseco, kaj, aliflanke, la bezonon de efika, altkvalita komunikado inter ĉiuj civitanoj de EU.

La Simpozion organizis Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvo-Problemoj, en kunlaboro kun la Universitato de Vilno kaj la Litova Akademio de Sciencoj, kun subteno de Esperantic Studies Foundation. Pliaj informoj troviĝas en la retpaĝaro de la Simpozio:

<http://www.esperantic.org/nitobe2005.htm>.

(Laŭ teksto el la reto)

### 3.1.2 La programo

Sabato, la 30a de julio	
Bonveniga sesio 1400-1445	<i>Humphrey Tonkin</i> , Usono (simpoziestro) Reprezentanto, Komitato pri Eŭropaj Aferoj, Litovia Parlamento Reprezentanto, Universitato de Vilno Reprezentanto, Litovia Akademio de Sciencoj
Temprelegoj 1 1445-1550	Tema enkonduko <i>Mark Fettes</i> , Kanado La aktuala stato de la eŭropa lingvopolitiko <i>Robert Phillipson</i> , Danlando
1550-1610	Paŭzo
Rondaj tabloj 1 1610-1730	Kion kapablas atingi la Simpozio? Partoprenantoj diskutas 8-10-ope, sen interpretado. Grupestroj respondecas pri reguligo de la lingvoj de diskutoj kaj de skribaj raportoj.
1730-2000	Akcepto kaj vespermanĝo
Dimanĉo, la 31a de julio	
Temprelegoj 2 0900-1030	Tri lingvaj estontecoj por Eŭropo <i>François Grin</i> , Svislando Mastrumi la anglan en multlingva Eŭropo <i>Philippe van Parijs</i> , Belgio
1030-1050	Paŭzo
Podia diskuto 1 1050-1220	Lingvaj evoluoj kaj ebloj: Perspektivoj el la malnovaj EU-Ŝtatoj <i>Roland Breton</i> , Francio <i>Sean O'Riain</i> , Irlando <i>Michael Cwik</i> , Belgio <i>Detlev Blanke</i> , Germanio
1220-1400	Tagmanĝo
Podia diskuto 2 1400-1550	Lingvaj evoluoj kaj ebloj: Perspektivoj el la novaj EU-Ŝtatoj <i>Ina Druviete</i> , Latvio <i>Gyorgy Nanovsky</i> , Hungario <i>Anna Verschik</i> , Estonio <i>Jozef Reinart</i> , Slovakio
1550-1610	Paŭzo
Rondaj tabloj 2 1610-1730	Ĉu multilingva estonteco? Vizioj pri EU en la jaro 2030 Partoprenantoj diskutas 8-10-ope, sen interpretado. Grupestroj respondecas pri reguligo de la lingvoj de diskutoj kaj de skribaj raportoj.
1730-2000	Akcepto kaj vespermanĝo

Lundo, la 1-a de aŭgusto	
Podia diskuto 3 0900-1030	La kapabloj kaj kaptiloj de lingvopolitiko <i>David Graddol</i> , Britio <i>John Edwards</i> , Kanado <i>Paulin Djite</i> , Aŭstralio
1030-1050	Paŭzo
Rondaj tabloj 3 1050-1215	Paŝoj al pli bona politiko de lingvoj Partoprenantoj diskutas 8-10-ope, sen interpretado. Grupestroj respondecas pri reguligo de la lingvoj de diskutoj kaj de skribaj raportoj.
1215-1400	Tagmanĝo
Konkluda sesio 1400-1700	Kiel plibonigi la lingvopolitikon en plivastigita EU ? Humphrey Tonkin

### 3.1.3 “Lingvopolitikaj aspektoj de la plivastiĝo de Eŭropa Unio”

#### *Konkluda Dokumento de 4-a Nitobe-Simpozio*

#### **Kunteksto**

Inter la multaj problemoj levitaj de la plimultigo de la membraro de la Eŭropa Unio estas la lingvo-problemo.

Kvankam la Traktato de Romo antaŭvidis egalecon de statuso por la naciaj lingvoj en la institucioj de EU, konsiderinde altiĝis la baroj al efektivigo de tiu principo, en la nuna situacio de 25 ŝtatoj-membroj kun 21 oficialaj lingvoj, pli ol 25 regionaj kaj minoritataj lingvoj, kaj multaj iom grandaj enmigrantaj lingvokomunumoj, ĉiuj kun tre diversaj nombroj de parolantoj.

Sen atenta, sistema, kaj bone financata aliro al mastrumo de la multlingva karaktero de EU, la lingvoj kaj kulturaj valoroj de iuj el la pli malgrandaj ŝtatoj kaj neŝtataj lingvogrupoj povus minaciĝi, kun sekva kompromito de la principo de egaleco inter EU-membroj kaj malfermiĝo al novaj specoj de konflikto kaj lukto en kaj inter nacioj.

Tiu situacio estis fokuso de la IV-a Nitobe-Simpozio, organizita de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj en kunlaboro kun la Komitato pri Eŭropaj Aferoj de la Litova Parlamento, la Akademio de Sciencoj de Litovio, kaj la Universitato de Vilno. Pli ol 70 partoprenantoj el pli ol 20 landoj, inkluzive de naŭ novaj ŝtatoj-membroj de EU, kunvenis por esplori la diversajn politikajn alternativojn kaj serĉi unuanimecon pri kelkaj bazaj rekomendoj pri la lingvopolitiko de EU sub la novaj kondiĉoj.

## **Zorgo-donaj evoluoj**

La simpozianoj komune esprimis fortan apogon al la procezo de eŭropa integriĝo, kaj precipe al la streboj disvolvi justan, demokratian kaj altkvalitan komunikadon inter ĉiuj eŭropanoj. Ili ankaŭ dividis la kredon, ke la aktuala lingvopolitiko de EU, ĉu en la EU-institucioj mem, ĉu je la nivelo de naciaj registaroj, estas neadekvata por atingi tiujn celojn. La jenaj problemaj evoluoj ŝajnas larĝe disvastigitaj tra EU:

- Neglekto de lingvaj demandoj en la politika decidofarado sur terenoj kiel ekzemple supera edukado, sciencaj esploroj, kaj amaskomunikiloj, kun negativa efiko je la valoroj kaj bezonoj de malgrandaj naciaj kaj nenaciaj lingvokomunumoj;
- Tolerado aŭ kultivo de normoj de lingva praktiko, kiuj kontraŭas la principojn de multlingvismo kaj lingva egaleco, ofte estigante situaciojn en kiuj homoj kun limigita aŭ nenia rego de la angla lingvo ne povas partopreni egalece en la politika decidoprocezo en EU;
- Troa dependo je ekzistantaj lingvorilataj institucioj kaj ideoj, kiujn oni ne evoluigis por alfronti demandojn en eŭropa aŭ tutmonda kunteksto — tendenco kiu refortigas persistan mankon de lingvaj konscio kaj faka kono en registaroj je ĉiuj niveloj.
- Rimarkinda redukto de la instruado de lingvoj aliaj ol la angla, malpliigante la ŝancojn ke eŭropanoj akiras profundajn komprenon kaj estimon de la kulturoj de najbaraj landoj, kaj refortigante eksterproportcian ĉeeston de britaj kaj usonaj kulturaj produktoj tra EU;
- Evito de malferma publika diskutado de lingvopolitiko, kaj precipe de realecaj alternativoj al la nuna situacio de oficiala sed dubkvalita multlingvismo ligita al la nereguligita kaj neegaleca disvastiĝo de la angla.

En la kunteksto de la 25-membra Eŭropa Unio, simpozianoj opiniis ke tiuj lingvopolitikaj malfortoj tendencas subfosi la lingvojn de la pli malgrandaj ŝtatoj. Simpoziaj prelegantoj atentigis pri la ekzisto de signifaj ekonomiaj kaj politikaj ŝarĝoj truditaj de la nuna sistemo al la parolantoj de tiuj lingvoj, kaj ili esprimis timon, ke tio longperspektive kondukos al la perdo de statuso kaj vivanteco de ĉiuj lingvoj escepte de la plej grandaj.

## **Agadkampoj**

Kvankam ili pledas por vasta gamo de ideoj kaj prioritatoj en la traktado de tiuj problemoj, partoprenantoj de la simpozio interkonsentis pri la sekvaj kvin ĉefaj agadirektoj:

1. **Komuna kadro.** Oni bezonas konstrueman, realisman lingvopolitikan kadron por la Eŭropa Unio de 25 landoj, kiu ekvilibrigu protektadon kaj aprezadon de lingva diverseco kun la bezono de efika, altkvalita komunikado inter ĉiuj civitanoj de EU. Partopreno de larĝa gamo de individuoj kaj institucioj, reprezentantaj multajn diversajn perspektivojn kaj interesojn, estos nepre necesa por realigi tian vizion.
  
2. **Publika kaj politika debatoj.** Por estigi la bezonatan politikan volon subtene al tia komuna kadro, necesas multe pli da klopodoj altigi la nivelon kaj intensecon de la prilingvaj debatoj publikaj kaj politikaj. La malavantaĝoj de la nuna sistemo, la investitaj interesoj kiuj subtenas ĝin, kaj aro da pozitivaj politikaj alternativoj bezonas vortumadon en manieroj kiuj ebligas diskutadon inter ordinaraj homoj, raportadon fare de ĵurnalistoj, kaj konkretajn elpaŝojn flanke de elektitaj deputitoj. Gravas disvolvi longdaŭrajn politikajn interesgrupojn kaj koaliciojn por alstrebi lingvan egalecon, diversecon, kaj vivipovon.
  
3. **Diversaj solvoj.** En la evoluigo de komuna lingvopolitika kadro, necesas atenti almenaŭ jenajn kvin agadkampojn, el kiuj ĉiu povus postuli malsaman kombinaĵon de solvoj kaj iom malsaman politikan strategion:
  - internan kaj profesionan komunikadon de EU-institucioj, kio intime ligiĝas al la profesia kulturo kaj la memregado de la institucioj mem;
  - oficialan komunikadon de EU-institucioj kun civitanoj kaj registaroj, kiun reguligas la politikoprocedo de EU inkluzive de ŝtatoj-membroj, la Konsilio de Ministroj, kaj Eŭropa Komisiono, ktp.;
  - mastrumon de la lingva situacio de la ŝtatoj-membroj de EU, kiu estas sub jurisdikcio de naciaj parlamentoj kaj fine respondas al la demokrata procedo;
  - mastrumon de komunikado kaj kulturaj rilatoj, interne de EU, flanke de grandega gamo de publikaj, profesiaj, komercaj, neregistaraj kaj privataj organizaĵoj kaj institucioj, kies lingvopolitikoj estas plejparte memstaraj sed ofte forte limigitaj de ekonomiaj kaj politikaj faktoroj;
  - eksteran komunikadon de EU-institucioj kaj ŝtatoj-membroj kun ne-eŭropaj ŝtatoj kaj internaciaj organizaĵoj, kiu estas influata de kuntekstoj same tutmondaj kiel lokaj, kaj siavice povas havi implicojn por politikaj decidoj ene de EU mem.
  
4. **Alternativaj vizioj.** La evoluigo de komuna kadro, kaj de politikaj solvoj en difinitaj kuntekstoj, profitos el informita publika debatado pri konkurencaj vizioj de la lingva estonteco de la Eŭropa Unio. Inter la vizioj atendantaj formuladon kaj ellaboron estas la jenaj:
  - Vizioj, kiuj tiras konkludojn el diversaj modeloj de multilingvismo tra la mondo por pli bone kompreni la dinamikon kaj potencialajn fortojn

kaj malfortojn de la EU-lingvosistemo, kaj ĝia loko ene de tutmonda lingvosistemo;

- Vizioj, kiuj difinas kaj defendas la statuson kaj bezonojn de malgrandaj naciaj kaj ne-naciaj lingvokomunumoj, kaj indiĝenaj kaj enmigraj, ene de EU;
- Vizioj, kiuj disvolvas politikajn rimedojn por certigi ke iu ajn vaste uzata interlingvo ne subfosu la pluvivipovon de la naciaj lingvoj, la egalecan traktadon de ties parolantoj en EU-institucioj, kaj la konservadon de kultura diverseco;
- Vizioj, kiuj esploras la potencialan rolon de Esperanto ene de komuna lingvokadro de EU, precipe en rilato al ĝiaj ekonomiaj avantaĝoj kiel pivota lingvo en tradukado kaj interpretado, ĝia efikeco kiel enkonduko al lingvolernado, kaj ĝiaj meritoj sur la kampo de interkultura komunikado;
- Vizioj, kiuj projekcias la estontan disvolviĝon de lingva kaj komunika teknologio, kaj de novaj sistemoj de fremdlingva edukado, kaj iliajn potencialojn sekvojn en lingvo - lernado kaj –uzado ene de EU.

**5. Politika kaj fakula kunlaboradoj.** La Kvara Nitobe-Simpozio konsistigis unu el la unuaj okazoj, kie politikistoj kaj fakuloj el plimulto de la ŝtatoj de la pligrandigita EU povis diskuti komunajn zorgojn kaj prioritatojn sur la tereno de lingvopolitiko kaj komunikado. Progreso pri la demandoj skizitaj ĉi tie dependos de plua kaj plivastiĝanta kunlaboro de ĉi tiu speco, inkluzive de:

- Regulaj kunvenoj, kaj je EU-nivelo, kaj inter diversaj ŝtataj grupiĝoj, ekzemple en la formo de lingvopolitika konferenco por la malpli grandaj EU-ŝtatoj kiel oni proponis dum la Simpozio;
- Disvolvo de reto por sciencaj esploroj, kiu kunligas esploristojn pri la ekonomiko, sociologio, politiko, kaj planado de lingvoj (inkluzive i.a. de edukaj, terminologiaj, kaj juraj aspektoj) kaj kiu kapablas provizi rapidajn kaj bone dokumentitajn informojn al decidofarantoj kaj al ĵurnalistoj;
- Daŭra komunikado per retoj kaj aliaj rimedoj, kun la celo engaĝi kreskantan nombron da ŝlosilaj individuoj en la akademiaj, administraj kaj politikaj medioj de la EU-ŝtatoj, por la evoluigo de komunaj solvoj al komunaj lingvaj problemoj.

La evoluo de EU en kompleksan, novspecan formon de internacia kunlaboro postulas novajn alirojn al la mastrumado de multlingvismo kaj de efika, egaleca komunikado. La disvolvo de kapabloj sur ĉi tiu tereno, en la formo de novaj ideoj, fakaj kompetentoj, kaj institucioj, estas urĝa prioritato kiu meritas atenton kaj rimedojn de la naciaj registaroj same kiel de la EU-instancoj.



## **Dankoj**

La partoprenantoj de la IV-a Nitobe-Simpozio deziras danki la organizantojn kaj subtenantojn de tiu ĉi unua renkontiĝo, kaj precipe al la litova parlamento, pro la afabla disponigo de kunvenejo kaj interpretaj servoj, kaj al Esperantic Studies Foundation (Washington, Usono) pro ties malavara financa subteno.

### **3.1.4 “Language Policy Implications of the Expansion of the European Union”**

#### *Concluding Document of the 4<sup>th</sup> Nitobe Symposium*

##### **Context**

Among the many questions raised by the expanded membership of the European Union is the question of languages. While the Treaty of Rome foresaw equality of status for national languages in EU institutions, the challenges to achieving this in practice are considerable, now that membership has grown to 25 member states with 21 official languages, more than 25 regional and minority languages, and many sizeable immigrant language communities, all with widely varying numbers of speakers. Without a careful, systematic, and well-funded approach to managing the multilingual nature of the EU, the languages and cultural values of some of the smaller states and non-state language groups could come under threat, compromising the principle of equality among EU members and opening the way to new kinds of conflict and struggle within and between nations.

This situation was the focus of the 4<sup>th</sup> Nitobe Symposium, organized by the Centre for Research and Documentation on World Language Problems in cooperation with the European Affairs Committee of the Lithuanian Parliament, the Lithuanian Academy of Sciences, and the University of Vilnius. More than 70 participants from over 20 countries, including nine new EU member states, met to explore the various political alternatives and seek consensus on some basic recommendations on EU language policy under the new conditions.

##### **Concerns**

The participants in the Symposium shared a strong commitment to the process of European integration, and in particular to the pursuit of fair, democratic, and high-quality communication among all Europeans. They also shared the belief that current language policies in the EU, both within EU institutions and at the level of national governments, are inadequate to achieving these goals. The following problematic trends appear to be widespread across the EU:

- Failing to treat linguistic issues as a significant aspect of policy-making in such areas as higher education, scientific research, and communications media, to the detriment of the values and needs of small national and non-national language communities;

- Tolerating or encouraging language practices which contravene the principles of multilingualism and linguistic equality, frequently leading to situations in which people with limited or no command of English are unable to participate on equal terms in the EU policy formation process;
- Relying too much on existing language-related institutions and ideas that were never intended to address issues in the European or global context, entrenching a chronic lack of linguistic awareness and expertise in governments at all levels;
- Dramatically reducing the teaching of languages other than English, making it less likely that Europeans will gain a deep understanding and appreciation of the culture of neighbouring countries, and reinforcing a disproportionate presence of British and American cultural products throughout the EU;
- Avoiding open public discussion of language policy, and in particular of viable alternatives to the present situation of official but half-hearted multilingualism coupled with the unregulated and uneven spread of English.

In the context of the 25-member European Union, these failings of language policy were seen as tending to undermine the languages of the smaller states. Speakers at the Symposium noted the existence of significant economic and political burdens imposed on speakers of these languages by the current system, and voiced fears that this would lead in the long run to a loss of status and vitality for all but the largest national languages.

## Commitments

While advocating a wide range of ideas and priorities for addressing these issues, participants in the Symposium agreed on the following five major commitments.

1. ***A common framework.*** A constructive, realistic language policy framework for the European Union of 25 countries is needed, that would balance the protection and celebration of linguistic diversity with the need for effective, high-quality communication amongst all the citizens of the EU. The participation of a wide range of individuals and institutions, representing many different perspectives and interests, will be vital in order to transform such a vision into reality.
2. ***Public and political debate.*** In order to generate the necessary political will behind such a common framework, much more effort is needed to raise the level and intensity of public and political debate over language policy. The disadvantages of the current system, the vested interests that sustain it, and a range of positive policy alternatives need to be formulated in ways that can be discussed by ordinary people, reported on in the

media, and addressed in practical terms by elected politicians. Long-term political constituencies and coalitions for the promotion of language equality, diversity, and sustainability need to be developed.

**3. *Diverse solutions.*** The development of a common language policy framework needs to address the following five areas, each of which may involve a different set of solutions and a somewhat different policy process:

- the internal and professional communication of EU institutions, which is closely connected to the professional culture and self-governance of the institutions themselves;
- the official communication of EU institutions with citizens and governments, which is regulated through the EU policy process involving member states, the Council of Ministers, the European Commission, etc;
- the management of the linguistic situation in EU member states, which comes under the jurisdiction of national parliaments and ultimately answers to the democratic process;
- the management of communication and cultural relations, internal to the EU, by an enormous range of public, professional, commercial, non-governmental, and private organizations and institutions, whose linguistic policies are largely autonomous but often highly constrained by economic and political factors;
- the external communication of EU institutions and member states with non-European states and in international organizations, which is affected by both global and local contexts and in turn may have implications for policy decisions within the EU itself.

**4. *Alternative visions.*** The development of a common framework, and of policy solutions in particular contexts, will be enriched by informed public debate over competing visions of the linguistic future of the European Union. Among the visions needing articulation and elaboration are the following:

- Drawing lessons from diverse models of multilingualism around the world to better understand the dynamics and potential strengths and weaknesses of the EU language system, and its place within the global language system;
- Defining and defending the status and needs of small national and non-national language communities, both indigenous and immigrant, within the EU;
- Developing policy frameworks to ensure that any widely used lingua franca does not undermine the continued vitality of national languages,

the equal treatment of their speakers in EU institutions, and the preservation of cultural diversity;

- Exploring the potential role of Esperanto within an EU language framework, with particular regard to the economic benefits of its use as a pivot language in translation and interpretation, its efficacy as a introduction to foreign language education, and its advantages as a medium of intercultural communication;
- Projecting the future expansion and impact of language and communication technologies, and of innovations in foreign language education, on language learning and use within the EU.

**5. *Political and expert collaboration.*** The 4<sup>th</sup> Nitobe Symposium provided one of the first opportunities for politicians and experts from a majority of states in the expanded EU to discuss common concerns and priorities in the area of language policy and communication. Progress on the issues identified here will depend on ongoing and increasing collaboration of this kind, including:

- Regular meetings, both at the level of the entire EU, and of groups of states within it, for example through the creation of a language policy conference for the smaller EU states as proposed at the Symposium;
- Development of a research network that brings together work on language economics, sociology, politics, and planning (including education, terminology, legislation, etc.), and can provide timely and well-founded information to policy-makers and the media;
- Ongoing communication by e-mail and other means, with the objective of engaging a growing number of key individuals in the academic, bureaucratic, and political establishments of EU member states in the development of common solutions to shared linguistic concerns

The emergence of the EU as a complex, novel type of international collaboration requires new approaches to the management of multilingualism and efficient, equitable communication. The building of capacity in this area, in the form of ideas, expertise, and institutions, is an urgent priority that deserves attention and resources from national governments and EU institutions alike.

## **Acknowledgments**

The participants in the 4<sup>th</sup> Nitobe Symposium wish to express their thanks to the organizers and sponsors of this initial meeting, and in particular to the Lithuanian Parliament, for its kind provision of meeting facilities and interpreters, and to the Esperantic Studies Foundation (Washington, USA) for its generous financial support.

### 3.2 Kulturdiplomatoj en Berlin pri eŭropa lingvo-politiko

La diplomatoj kun kulturaj taskoj en la diversaj eksterlandaj ambasadoj en Germanio formas la „Rondon de kulturdiplomatoj Berlin“. Al la estraro de ĉi tiu organizaĵo apartenis la Unua Sekretario de la irlanda ambasado en Germanio, Berlin, *d-ro Seán Ó Riain* (ekde aŭgusto 2005 li laboras en la irlanda ambasado ĉe Eŭropa Unio, Bruselo).

Laŭ iniciato de la irlanda diplomato la organizaĵo la 28-an de aŭgusto en Berlin okazigis kolokvon pri la temo „Samrajteco de lingvoj? – Ĉu la integriĝo de Eŭropa Unio minacas la lingvan diversecon?“

La prelegantoj estis:

- *Dr. Gerhard Sabathil*, estro de la reprezentejo de Eŭropa Komisiono en Germanio
- *Norbert Bärlocher*, estro de la sekcio kulturo kaj klerigado de la svisa ambasado en Germanio
- *Prof. Renato Cristin*, direktoro de Istituto Italiano di Cultura, Berlin
- *Christina Hesse*, estrino de la germana oficejo (Berlin) de la Ĝenerala Oficejo Tradukado de Eŭropa Komisiono
- *Iwona Hahn* kaj *Anna Schröder*, Pola Akademio de Sciencoj
- *Mark C. Donfried* (USA), Direktoro de Institute for Cultural Diplomacy, Berlin
- *Dr. Kurt Gawlitta*, regiona prezidanto de Verein deutsche Sprache e.V. (Societo germana lingvo, regiona organizaĵo Berlin-Potsdam)
- *Dr. Detlev Blanke*, prezidanto de Gesellschaft für Interlinguistik e.V., GIL (Societo pri Interlingvistiko)
- *Dr. Seán Ó Riain*, 1. Sekretario de Botschaft von Irland in Deutschland (irlanda ambasado en Germaio)

Malsame al la unuaj prelegantoj, kiuj ripetis vaste konatajn ĝeneralaĵojn nur la lastaj kvar aparte atentigis pri la konflikta lingvo-politiko.

*Donfried, Blanke* kaj *Ó Riain* krome klare pledis por pli serioza konsidero de Esperanto. La diskuto montris, ke la kolokvo pripensis la aŭskultantojn.

### 3.3 Pri lingvo-politiko kaj lingvo-kulturo en Eropo – la 15-a konferenco de GIL

La germana Societo pri Interlingvistiko (*Gesellschaft für Interlinguistik e.V.*, GIL) ĉiujare okazigas fakan konferencojn kaj eldonas la aktojn. Ĝi kunlaboras i.a. kun la lingvistika societo *Verein zur Förderung sprachwissenschaftlicher Studien e.V. (VFSS)* (Societo por Subteno de Lingvistikaj Studoj), kies membroj ĉiuj estas profesiaj lingvistoj.

Jam en la jaro 1999 GIL kaj VFSS komune okazigis tre sukcesan konferencon pri eŭropa lingvopolitiko. Partoprenis 80 personoj. La aktoj aperis.

En 2005 la 15-a konferenco de GIL okazis de la 28-a ĝis 30-a de oktobro en Berlin. La kadra temo estis “Lingvo-politiko kaj lingvo-kulturo en Eŭropo”. La komuna aranĝo okazis sabate, la 29-an de oktobro 2005. Partoprenis 50 personoj, inter ili konataj lingvistoj.

Jen la programo:

Malfermo *Dr. Detlev Blanke*, prezidanto de GIL  
Enkonduko en la konferencan temon *Dr. Jürgen Scharnhorst*, prezidanto de VFSS

*Prof. Dr. Gerhard Stickel*, iama direktoro de la Instituto por Germana Lingvo, Mannheim, prezidanto de EFNIL

La Eŭropo de la lingvoj - Klopodoj kaj spertoj de la Eŭropa Federacio de Naciaj Institutoj Lingvistikaj (European Federation of National Institutes of Linguistics, EFNIL)

1

*Prof. Dr. Johannes Klare*, Humboldt-Universitato Berlin  
Lingvo-kulturo kaj lingvo-politiko en Francio, Hispanio kaj Italio

*Doc. Wim Jansen*, Universitato de Amsterdam  
La nederlanda lingvo en la kunteksto de la eŭropa lingvo-politiko

*Dr. Vít Dovalil*, Karol-Universitato Praha  
Lingva situacio kaj lingvo-politiko en la Ĉeĥa Respubliko kun aparta konsidero de la rilatoj al Eŭropa Unio

*Prof. Dr. Karl Gutschmidt*, Universitato de Hamburg  
Problemoj kaj tendencoj de la lingvo-evoluo kaj lingvo-politiko en kelkaj lingvoj de iama Soveta Unio

*Dr.sc. Detlev Blanke*, Humboldt-Universitato Berlin  
Lingvo-politikaj aspektoj de la klopodoj pri internaciaj planlingvoj

*Dr. Jürgen Scharnhorst*, prezidanto de VFSS

Fermaj konkludoj

La diskutojn gvidis alterne *d-roj Jürgen Scharnhorst kaj Rudolf Fischer* (Universitato Münster).

La konferenco de GIL jam komenciĝis, vendrede, la 28-an de oktobro per la laŭstatuta jarĉefkunveno de GIL. Oni elektis novan estraron:

<i>Dr. sc. Detlev Blanke</i>	prezidanto
<i>PD Dr. habil. Sabine Fiedler</i>	vicprezidantino
<i>PD Dr. habil. Cornelia Mannewitz</i>	membro
<i>PD Dr. Dr. Rudolf Fischer</i>	membro
<i>Inĝ. Horst Jasmann</i>	trezoristo

Dimanĉe, la 30-an de oktobro, realiĝis jena programo:

*Dr. Rudolf Fischer* (Münster)  
Kompetenteco pri skribaj konoj de la angla en okcidenta Germanio

*Dr. Ulrich Lins* (Köln)  
Optimismo antaŭ 100 jaroj –La unua Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer 1905

*Dr. Vera Barandovská-Frank* (Paderborn)  
Informoj pri Ido-konferenco

*Prof. Dr. Helmar Frank* (Paderborn):  
La programo pri eŭrolingvistiko en Sibiu/Rumanio

*Dr. Till Dahlenburg* (Brüel)  
Leksikono de stilfiguroj en Esperanto

*Cyril Brosch* (Berlin)  
Preparata vortaro de lingvistikaj terminoj en Esperanto

## **4 Aliaj aranĝoj**

### **4.1. Internacia Studenta Konferenco en Ilmenau/Germanio**

De la 21-a ĝis 28-a de majo en Ilmenau/Germanio okazis Internacia Studenta Semajno, kiun partoprenis 700 studentoj el 100 landoj.

Por la scienca programo kelkaj studentoj de la Studenta Scienca Esperanto-Rondo de Jagelona Universitato en Krakovo/Pollando preparis prelegojn pri interlingvistikaj temoj:

*Magdalena Sławińska*

La projekto INTERKULTURO por pli bona interkompreniĝo

*Szymon Szymczak/W. Surma*

Filozofiaj premisoj de planlingvoj

*Małgorzata Nitkowska*

Esperanto – la lingvo kaj ties filozofio.

(Laŭ Pola esperantisto 3/2005, p. 20).

## **4.2 Pri la rolo de la germana kaj japana lingvoj en scienco en Tokio**

En la japana Gakushuin-Universitato, en Tokio la 13-an de septembro 2005 okazis konferenco pri la rolo de la germana kaj japana lingvo en scienco. Nur tri prelegantoj uzis la germanan kaj la aliaj ĉiuj la anglan. Tio jam sufiĉe klare montras la rolon de tiuj du lingvoj en "internaciaj" sciencaj aranĝoj. Tio eĉ pli evidentiĝis en la diskutoj. Malgraŭ ke *prof. Florian Coulmas* komence anoncis, ke la lingvoelekto estas libera, krom etaj esceptoj nur la angla estis uzata. Kvankam ĉiuj partoprenantoj kapablis paroli / kompreni la germanan aŭ la japanan, tiuj lingvoj estis uzataj nur dum paŭzo en privata interparolo. Kontraŭ la aserto de *prof. Konrad Ehlich*, ke necesas lingva diverseco en sciencaj kampoj por profunde evoluigi sciencan, *prof. Coulmas* opiniis, ke estas "mito", ke en prihomaj sciencoj malfacilas science komuniki kaj esprimiĝi en komuna "lingua franca" kiel la angla. Li donis ekzemplon de *prof. Juergen Habermas*, kiu bone mastras ankaŭ prelegon en la angla. *Prof. Coulmas* ĉeestinte tian prelegon, ne havis la impreson, ke *prof. Habermas* "suferis pro uzo de la angla". *Prof. Ehlich* rekomendis sincere esplori la signifon de lingvoelekto por evoluo de sciencoj. Tiusence estis bedaŭrinde, ke ne ĉeestis *prof. Hohenstein*, kies referaĵo estis dediĉita al tiu ĉi aspekto. El la referaĵoj aparte interesa estis la alvoko de *prof. Ulrich Ammon*, pripensi pri ebla porlingva alianco (kontraŭ la dominado de la angla) inter ekz. Germanio kaj Japanio, kiuj havas similajn interesojn en lingva kampo.

*KIMURA Goro*

## **5 Honorigo por prof. Aleksandro Duliĉenko**

Per dokumento de 23.1.2004 *prof. d-ro Aleksandro Duliĉenko* el Tartu/Estonio estis nomumita membro de la "Academia Scientiarum Gottingensis" (Göttingen/Germanio). Gratulon al la distingito.

---

**Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. [www.esperantic.org](http://www.esperantic.org). ISSN 1385-2191. Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.:+ 49-30-54 12 633, fakso:+ 49-30-54 56 742, [dblank.gil@snafu.de](mailto:dblank.gil@snafu.de). Mendu nur ĉe UEA. Kontribuojn sendu nur al la redaktoro, per retpoŝto aŭ sur diskedo/KD. Artikoloj sen indiko pri aŭtoreco estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Estas bibliografiataj ĉefe viditaj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro. Kunlaborantaj bonvenas.**

---